

Johann Wolfgang von Goethe,

Ein Gleiches (Wanderers  
Nachtlied)

Über allen Gipfeln  
Ist Ruh,  
In allen Wipfeln  
Spürest du  
Kaum einen Hauch;  
Die Vögelein schweigen im Walde.  
Warte nur, balde  
Ruhest du auch.

...

Johann Wolfgang von Goethe,

Same

*tradukita de Pejno Simono*

Super montopintoj —  
silent',  
tra pinopingloj  
la senvent'  
spiras sen fort';  
arbare la birdoj ekmutas.  
Pretu, aludas  
silento pri mort'.

...

Johann Wolfgang von Goethe,

Super montoj regas  
kviet'

*tradukita de Poul Thorsen*

Super montoj  
regas kviet',  
tra l' foliaro  
nur ventet'  
spiras kun trem'.  
Birdoj arbare silentas,  
se vi atendas,  
pacas vi mem.

...

Johann Wolfgang von Goethe,

Same tiel

*tradukita de Richard Schulz*

Super ĉiuj montoj  
Trankvil',  
Kaj ĉiuj fontoj  
Sen babil';  
Aŭdas vi ne  
Birdetan ĉirpon arbare.  
Pensu prepare  
Pri la pere'!

...

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas* JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 – †1832-03-22).

Arg-356-705 (2013-12-12 22:17:04)

*Verfasst am 6./7. September 1780 auf dem Kickelhahn (Gickelhahn) bei Ilmenau (Thüringen), wo Goethe die Verse mit Bleistift an die Bretterwand einer Jagdhütte schrieb. (Anm. d. Hrg.) Goethe verkis tiun ĉi poemon je la 6./7. de Septembro 1780 sur la monto Kickelhahn ĉe Ilmenau en Turingio (Germanio). Tie li skribis la versojn per krajono sur la tabulo-vandon de ĉasista kabano. (rimarkigo de l' eldoninto)*

*Traduko de la Germana poemo “Ein Gleiches (Wanderers Nachtlid)” de* JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 – †1832-03-22) *en Esperanton de* PEJNO SIMONO (*Simon Edward Adrian Payne*, \*1941-12-23).

Arg-356-1974 (2014-03-14 14:12:56)

*Tiu ĉi poem-traduko troviĝas en* <http://eo.wikipedia.org/wiki/Goethe>.

*Traduko de la Germana poemo “Ein Gleiches (Wanderers Nachtlid)” de* JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 – †1832-03-22) *en Esperanton de* POUL THORSEN (\*1915-01-07 – †2006-01-30).

Arg-356-708 (2010-05-28 21:34:24)

*Poul Thorsen estis dana Esperantista poeto, kiu verkis multajn originalajn kaj tradukitajn poeziaĵojn en la Internacia Lingvo. Vidu ankaŭ:* <http://www.poulthorsen.dk/> kaj <http://www.liberafolio.org/2006/forpasis-poul-thorsen/view>.

*Traduko de la Germana poemo “Ein Gleiches (Wanderers Nachtlid)” de* JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 – †1832-03-22) *en Esperanton de* RICHARD SCHULZ (*Rikardo Ŝulco*, \*1906-07-12 – †1997-09-26).

Arg-356-706 (2013-02-26 15:16:30)

*Tiu Esperantigo aperis komence de la okdekaj jaroj de la 20a jarcento en la “Vestfaliaj Flugfolioj”, kiujn eldonis Rikardo Ŝulco (Richard Schulz), honora membro de Germana Esperanto-Asocio. Pri Richard Schulz vidu la vikipedian retejon* [http://de.wikipedia.org/wiki/Richard\\_Schulz](http://de.wikipedia.org/wiki/Richard_Schulz). *Pri Richard Schulz vidu la vikipedian retejon* [http://de.wikipedia.org/wiki/Richard\\_Schulz](http://de.wikipedia.org/wiki/Richard_Schulz).